Prezo 7 €

http//:www.satesperanto.org

Majo-Junio 2014 - n-ro 5-6 (1305-1306)

SAT - Esperanto

# Sennaciulo

Oficiala organo de **Sennacieca Asocio Tutmonda**








## Civitanoj loke konstruas ontecon

Emmanuel Rolland prelegos pri tio enkongrese





## Kongres-temo

***SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!***









■ Kongresa tem-dosiero: Civitanoj loke konstruas ontecon - Paĝo 4




■ En Barcelono, en prikantado de la revolucio (III k fin') - Paĝo 16



■ Du semajnoj en Malagasio per Esperanto - Paĝo 18




■ Paŝo en la mondo - Paĝo 28



■ La Sankta Patrino Eklezio en nuna Hispanio far Miguel Fernandez - Paĝo 23




■ LEA-ana Elan' n-ro 3 - paĝo 30

# Redaktangulo

*Karaj legantoj,*

Prepare al la Kongreso en Dinano, ni liveras al vi ĉi numeron aparte informoriĉan. Ĝi en dua parto prezentas al vi ĉiujn necesajn dokumentojn por nia Kongreso en Dinano, t.e. la oficialajn raportojn priskribantaj la agadon de nia asocio en 2013.

Ankaŭ la unua parto rekte rilatas al nia Kongreso. La temo de ĉi Dosiero estas ĝuste tiu de la Kongreso: "Civitanoj loke konstruas ontecon". Surprizis nin ne ricevi pli da atestoj. Ni supozas, ke SAT-anoj kaj abonantoj al nia revuo estas tiel okupataj de partopreno en estont-konstruaj kunagoj, ke ili eĉ ne prenis tempon raporti pri sia agado. Ni vetas, ke la venonta numero aperigos pliajn ĉi-temajn kontribuojn, ĉar la nun publikigataj estas ja inspirigaj.

Vi trovos plie finon de du longegaj artikoloj, kiujn ni aperigis felietone: raporto pri restado en Malagasio de Diana Riŝar, kaj la majstra artikolo de Miguel Fernández prikantanta revolucion en Barcelono. De la sama aŭtoro, ni havas ĝojon publikigi alian artikolon pri la malprava spaco okupata en la publika vivo hispania de la rom-katolika eklezio. El alia vidangulo, Mir-Ko priskribas la staton de ateismo en Pollando, mondregiono ne fama pro ties ateismo... Kaj ankaŭ aliaj kontribuoj riĉigos vian legadon. Estu ĝi bona kaj...

... ne forgesu kunpreni ĉi numeron kun vi al Dinano!

*La Redakto-kunordigantaro*

# Venontaj tem-dosieroj

**Konspiroj kaj konspir-teorioj.**
Kunordigas Djémil Kessous - jam en preparo por venonta numero.

**Frateco.**
Kunordigas Francisko Degoul <frdegoul@wanadoo.fr>, 54 rue des Caillots, FR-93100 MONTREUIL, Francio.
Francisko pretas mem kontribui pri frateco en la verkaro de Zamenhof. Ekzistas multaj aliaj manieroj konsideri la temon. Se vi havas ideojn kaj pretas verki ion, bv. kontakti lin. Limdato estas la ***12-a de Septembro.***

Plie, en diversaj okazoj, estis proponitaj diversaj dosier-temoj, kies listo kuŝas ĉi sube. Ili ankoraŭ estas pendantaj pro manko de kunordiganto... Ni invitas vin kandidati kiel kunordiganto: nepagata laboro, sed riĉiga! Kontaktu la redaktoskipon ĉe:

**sennaciulo.redaktejo@gmail.com.**

- ❒ Kolektiva honorŝuldo proponita de Rob Moerbeek
- ❒ Veg(etar)anismo: kio, kial kaj kiel?
- ❒ Identiga funkcio de lingvoj
- ❒ Religioj kiel naciaj identigiloj en nuna mondo
- ❒ Esperanto kaj aliaj malfermaj rimedoj (Liberaj programoj, ktp)
- ❒ Esperanto kaj sindikatoj
- ❒ Lanti
- ❒ Internaj ideoj de Esperanto
- ❒ Krizo, ĉu pordoj al nova konscio?
- ❒ Etikaj bankoj

# Enhavo


Redaktangulo 3
Venontaj tem-dosieroj

**Tem-dosiero : Civitanoj loke konstruas ontecon**
Enkonduko 4
Agi loke
Nova mondo endas - Anĝeva ekzemplo 5
Revolucia simpleco 6
Alvoko por internacia renkontiĝo cele al la starigo de Bloko por la Integra Revolucio 7

**Prepare al la Kongreso**
Agadraporto de la PK 10
Agadraporto de la ĜK-aro 13
Financa raporto 14
Aliĝintoj al la SAT-Kongreso 2014, dua listo 15

**Felietone**
En Barcelono, en prikantado de la revolucio (III) 16
Du semajnoj en Malagasio per Esperanto (II) 18

**Socio kaj religio**
Tagoj de ateismo en Pollando 21
La Sankta Patrino Eklezio en nuna Hispanio 23

**SAT-anoj aktivas**
Juĝejo de Fukui malaprobis refunkciigon de la nukleaj reaktoroj n-roj 3 kaj 4 de Ooi 26
Superhomoj regas super homoj sed ne sin. Poemo 28
Bonvenon en Greziljono!
Paŝo al la mondo

**El la SAT-administrejo**
Landaj perantoj 29
Kotizoj 2014
Praktikaj informoj
Novaliĝoj 30
Nekrologoj
LEA-ana Elan' n-ro3
En Sud-Kivu, SAT-amikaroj aktivas 31
26-a Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage, Francio 32


**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas.**